BRNO



INVITAS VIN!

URBO ĉirkaŭita de freŝe verda herbeja kaj arbara zono

URBO ornamita de historiaj memorindajoj

URBO kun mondkonata industrio kaj vigla komerco

URBO elektita por Ekspozicio de Nuntempa Kulturo en Ĉeĥoslovakio

URBO de Kunveno de Moraviaj kaj Sileziaj Esperantistoj

TIO ESTAS BRNO (BRÜNN)

ESPERANTISTA KLUBO BRNO
ĈEĤOSLOVAKIO
V E V E Ř Í 2 8

ARANĜOS OKAZE DE LA EKSPOZICIO DE NUNTEMPA KULTURO EN ĈEĤOSLOVAKIO

KUNVENON DE MORAVIAJ KAJ SILEZIAJ ESPERANTISTOJ EN BRNO

LA 7AN KAJ 8AN DE JULIO 192[illegible]

NI DEZIRAS AL VI, KE VI UZU TIUN OKAZON POR VIDI LA REZULTOJN DE HOMA LABORO KAJ POR PASIGI TEMPON INTER MULTAJ SAMIDEANOJ. BONVOLU ATENTIGI ANKAŬ VIAJN KONATULOJN PRI LA KUNVENO KAJ LA EKSPOZICIO. NI PETAS TIUJN SAMIDEANOJN - KIUJ JAM INTENCIS VIZITI LA EKSPOZICION, SED EN ALIA TEMPO - KE ILI ŜANĜU LA DATON DE SIA VENO, POR KE ILI POVU ĈEESTI ANKAŬ LA KUNVENON

PROGRAMO DE LA KUNVENO

SABATE 7. VII. 1928

19·30 h.: Amika vespero kun amuza programo en „Besední dům", Komenského náměstí n-o 7

DIMANĈE 8. VII. 1928

9-13 h.: Solena kunveno kaj labora kunsido-pritrakto de diversaj aferoj en „Nova landa domo" Žerotínovo nám. n-o 3-5

P o s t t a g m e z e

Ĉirkaŭiro tra Brno, ekskursoj en ĉirkaŭaĵon

KOTIZO POR LA KUNVENO

ĈEĤOSLOVAKOJ . . . . . po Kč 9·-
AŬSTRIANOJ . . . . . po S 2·30
GERMANLANDANOJ . . . . . po M 1·30
ALILANDANOJ . . . . . po 4 respondkuponoj

Post la ricevo de via aligilo ni sendos al vi transpagilon de ĉeĥoslovaka, aŭstria aŭ germana poŝta ĉekoficejo. Kiam la kotizoj estos pagitaj, ni sendos al vi la necesajn dokumentojn

EKSPOZICIO DE NUNTEMPA KULTURO EN ĈEĤOSLOVAKIO, BRNO

LEGITIMACIO kostas Kč 18·-. La posedanto de la legitimacio havas rajton je 33%-a rabato de veturpago por ĉeĥoslovakaj ŝtataj fervojoj de sia loĝurbo aŭ de la limstacio al Brno kaj reen. Krom tio la legitimacio validas kiel bileto por unu eniro.

BILETO por unu eniro kostas Kč 10·-. 50 biletoj por partoprenontoj plej frue aliĝintaj estos po Kč 6·50

LOĜADO

Urba loĝiga oficejo prizorgas loĝejojn por vizitontoj de la Ekspozicio

H

LOĜADO EN HOTELOJ laŭ diversaj prezoj estas prizorgata nur por eksterlandanoj

P

LOĜADO EN PRIVATAJ DOMOJ. Por unu persono dum unu nokto Kč 10·-, Kč 15·-, Kč 20·-, Kč 25·- aŭ Kč 30·-. Krom tio oni devas pagi urbajn impostpagojn

K

LOĜADO EN KOMUNAJ LOĜEJOJ. Por unu persono dum unu nokto Kč 10·-

N. B.

Via propra intereso estas, plej baldaŭ mendi loĝejon. Tiuj gesamideanoj, kiuj aligos malfrue, ne plendu poste, se ili ne ricevos loĝejojn. Tuja aligo estas do ne nur konsilinda, sed senkondiĉe necesa

ĜIS LA REVIDO EN BRNO

POKORNÝ A SPOL. V PRNĚ.